



**PILO-PRESS**

Internacia  
Informservo

N-ro 22/1973 3 okt 1973  
Aperas ĉiusemajne



**Eldonanto/Herausgeber:**

Ludwig Pöckel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69



## Universala Kongreso de Esperanto

**59-a**

Apude

Salutvortoj  
de Peter  
Schultz,

Unua Urbestro  
de Hamburg  
al la parto-  
prenontoj de  
59-a UK en  
Hamburg de  
la 27 julio -  
3 aŭgusto 74

*Laŭ la konstitucio de Hamburgo estas la tasko de la Libera kaj Hansa urbo, en la spirito de paco esti peranto inter ĉiuj kontinentoj kaj popoloj. Al renkontiĝado, al interparolado servas la nova "Congress Centrum Hamburg", en kiu la 59a Universala Kongreso de Esperanto kunigos delegitojn de pli ol 50 nacioj. En ĉi tiu senco de interpopola kompreniĝo kaj de progresigo de paco, mi bonvenigas la delegitojn kaj gastojn de la Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo, la socia urbo malferma al la tuta mondo.*

*Peter Schultz  
Unua Urbestro de la  
Libera kaj Hansa urbo Hamburg*

## Die Sprache des grünen Sterns

### Esperanto kennt keine Dolmetscher

Berlin (GDR) Kiel ni jam informis en n-ro 37/1973 de Neue Berliner Illustrierte NBI Die Zeit im Bild aperis intervjuo kun Rudi Graetz, prezidanto de CL Esperanto en Kulturligo de GDR, sur du bildpaĝoj kun diversaj tekstoj. Apude estas la germana teksto de la intervjuo, kiu legiĝas en E-traduko jene:

Ĉu Esperanto havas ŝancon, fariĝi iam mondlingvo? Kiel interkomprenigilo nepre, sed ĝi ne volas kaj ne povas anstataŭigadi forpremi naciajn lingvojn, kiuj estas nedisigeble ligitaj kun historio kaj kulturo de ĉiu popolo kaj stampitaj per naciaj apartaĵoj.

Ĉu Esperanto hodiaŭ jam estas larĝskale disvastigita? - La 58an mondkongreson de la esperantistoj en Beograd, de kiu mi revenis dum tiuj ĉi tagoj, vidis 1843 partoprenintoj el 43 landoj. La esperantistoj de Soveta Unio kaj de aliaj socialismaj landoj ludis efikan rolon sur tiu ĉi mondkongreso. Esperanto, ĉar jam tre disvastigita, sukcese estas metata en la servon de la komuna socialisma afero.

(Traduko laŭ informo de Centra Laborrondo Esperanto)

Tutpaĝa kolora bildo montras ges-rojn Graetz kun la flago de Esperanto-grupo Rostock kaj Esperanto libroj.

#### INTERVIEW

### Vom Weltkongreß zurück

NBI sprach mit Handelsrat Rudi Graetz, Vorsitzender des Zentralen Arbeitskreises Esperanto im Kulturbund der DDR, Mitglied des Internationalen Komitees der MEM (Mondpaca Esperantista Movado = Weltfriedens-Esperantistenbewegung) im Weltfriedensrat.

*Hat Esperanto die Chance, einmal Weltsprache zu werden? Als Verständigungshilfsmittel durchaus, aber es will und kann nie Nationalsprachen ersetzen oder verdrängen, die untrennbar mit Geschichte und Kultur eines jeden Volkes verbunden und durch nationale Besonderheiten geprägt sind.*

*Ist Esperanto heute schon weit verbreitet?*

Der 58. Weltkongreß der Esperantisten in Beograd, von dem ich dieser Tage zurückkehrte, sah 1843 Teilnehmer aus 43 Ländern. Die Esperantisten der Sowjetunion und der anderen sozialistischen Länder spielten auch auf diesem Weltkongreß eine wirksame Rolle. Esperanto wird erfolgreich, da bereits so sehr verbreitet, auch in den Dienst der gemeinsamen sozialistischen Sache gestellt.

In rappresentanza del Governo il senatore Alberto Del Nero, sottosegretario al lavoro e alla Previdenza sociale, ha tra l'altro ricordato come «una lingua comune a tutti, che salvaguardi la vita di tutte le lingue nazionali, si rende sempre più necessaria». Egli ha inoltre affermato che i Paesi in via di sviluppo tendono a sbarazzarsi delle lingue ereditate dal periodo coloniale. «E questo dimostra quanto siano infondate le speranze di introdurre a livello nazionale una qualunque lingua nazionale, per diffusa che oggi essa possa apparire».

Il rappresentante del Governo italiano ha sottolineato: «L'esperanto va diffondendosi rapidamente, soprattutto attraverso i corsi organizzati nelle scuole, in numerosi Paesi del mondo» e ha ricordato il progetto di legge n. 342, che prevede l'insegnamento dell'esperanto nelle tre classi della scuola media.

# L'esperanto nelle scuole nel lavoro nella politica



Trento (pp) Jam en la pasinta numero ni raportis pri la 44a Itala Esperanto-Kongreso. Hodiaŭ ni publikigas eltranĉaĵon el la gazeto "L' Adige" de la 17 sep 73 kun la E-traduko, kiun disponigis al ni Georg Chr. Sack, Heidelberg, kiu ĉeestis la kongreson:

"Reprezentante la registaron, senatoro Alberto Del Nero, vicministro pri laboro kaj socialaj aferoj, memorigis i.a., kial "unu lingvo komuna al ĉiuj, kiu protektas la vivon de ĉiuj naciaj lingvoj, fariĝas pli kaj pli necesa." Cetere li certigis, ke la evoluendaĵ landoj celas forigi la hereditajn lingvojn de la kolonia periodo

kaj tio prezentas, kiom estas nefonditaj la esperoj, enkonduki je nacia nivelo unu ajn nacian lingvon, kvankam nun ĝi ŝajne estas disvastigita.

La reprezentanto de la itala registaro substrekis: "Esperanto disvastigas rapide, precipe fare de kursoj organizataj en lernejoj de multnombraj landoj de la mondo", kaj li memorigis pri la leĝa propono n-ro 342, kiu projektas Esperanto-instruadon en tri klasoj de la mez-lernejo.

\*\*\*\*\*



Haukeli-monto (pp/ema) Ĉiujare la okcident-norvegaj esperantistoj komence de la aŭtuno renkontiĝas sur la montaro inter orienta kaj okcidenta Norvegujo. Ĉi-jare tiu ŝatata kunveno sur la Haukeli-monto okazis la 15 kaj 16 sep, kiu tre bone sukcesis. Oni rigardis kolorfilmon pri la Beograda UK, prezentita de O. Thormodsen kaj kantis kaj dancis je neforgesebla muziko de Norman Birkeli sur la norvega instrumentu Hardangervidono. Sed oni ankaŭ diskutis pri klubaj agado kaj la studado de Esperanto dum klubaj kunvenoj. Organizanto de la renkonto estas la Okcidenta Distrikto de Norvega Esperantista Ligo sub sia prezidantino Elna Matland.

**Kalina Dobrzynsky-Pienkiewicz** und **Zbigniew Dobrzynsky**, Schauspieler aus Warschau, sind morgen Gäste der Nürnberger Esperanto-Gruppe. Die beiden Polen befinden sich zur Zeit mit einer Komödie aus ihrer Heimat auf einer Deutschlandtournee. Aus Termingründen können sie in Nürnberg nicht gastieren, dafür steht wenigstens ein kurzer Besuch auf dem Programm.

Proksima  
Nekonato

en Frankonio  
Nürnberg (pp)

**Polnische Schauspieler**  
**gastieren in Bamberg**

Am Mittwoch, 3. Oktober, um 19 Uhr, findet in der Volkshochschule Bamberg, Berufsschule, Saal 469, eine Theateraufführung in Esperanto statt. Die polnischen Schauspieler **Kalina Dobrzynsky-Pienkiewicz** und **Zbigniew Dobrzynsky** spielen die Komödie „Proksima Nekonato“, (Ein nahe Unbekannter) von **Aleksander Scibor-Rylski** in der Esperanto-Übersetzung von **Jerzy Grum**.

Die polnischen Schauspieler befinden sich zur Zeit auf einer Deutschland-Tournee, nachdem sie das Theaterstück, eine Persiflage über eheliche Konflikte, bereits erfolgreich in den Vereinigten Staaten und in den Benelux-Ländern zur Aufführung brachten. Dank der gekonnten darstellerischen und sprachlichen Leistung der polnischen Künstler ernteten sie stets viel Beifall, so auch vor einigen Tagen in Würzburg.

en Usono kaj Beneluko la "La Proksima Nekonato" nun gastas en Frankonio, la norda parto de Bavario. Kompreneble temas pri la pola teatraĵo en Esperanto de **Aleksander Scibor-Rylski** en la Esperanto-traduko de **Jerzy Grum** kaj ludata de la polaj profesi-aj geaktoroj **Kalina Dobrzynsky-Pienkiewicz** kaj **Zbigniew Dobrzynsky** el Varsovio.

Ĝaŭde la 27 sep 73 prezentado okazis en la luksa klubejo de la Esperanto-grupo Würzburg antaŭ ĉ. 30 spektantoj. Ŝajnas al mi, ke "Proksima Nekonato" estas la plej taŭga teatraĵo por la Esperanto-medio, ĉar ĝi povas esti ludata antaŭ malgranda publiko, kio kreas vivan kontakton inter la aktoroj kaj la spektantoj. Kaj fakte tiel okazis en Würzburg. Kelkfoje mi sentis min alparolita kaj partoprenanta en la teatraĵo, kvazaŭ mi mem estus tiu urseto karesita kaj riproĉita de ursinjino. La prezentado estis perfekta kaj elstara laŭ arta kaj lingva vidpunktoj. Multe da aplaŭdo dankisal la **Kalina kaj Zbigniew**.



Sabate, la 29 sep 73, la teatraĵo estis prezentita en Mainz, pliaj prezentadoj okazos en Bamberg kaj Hamburg. Poste la polaj geaktoroj vojaĝos al Danlando.

En "Nürnberger Nachrichten", 1. okt. 73 (supre maldekstre) kaj en "Fränkischer Tag Volksblatt" 2. okt 73 aperis informoj pri la prezentadoj laŭ raportoj de END, la germana informservo de Pilo-Press.

\*\*\*\*\*

Nova Konkurso de Pola Radio

**Varsovio** (pp) Kunlige kun la jartrideko de la Pola Popola Respubliko en 1974 Pola Radio okazigas novan konkurson kun multaj premioj, i.a. dek-tagaj vojaĝoj tra Pollando. Oni devas respondi al unu el tri demandoj. Petu la konkurson informilon de Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O.B. 46, PL-00 950 Varsovio. Jam 15 esperantistoj gajnis la ĉefpremion.

\*\*\*\*\*  
\* BRAVE ! \*  
\* Kiu fondas kune kun 35jara ĝardenisto grupon por ĝardenflegado \*  
\* aŭ biologian ĝardenojon? (i.a. cele perfektigon en Esperanto \*  
\* kaj varbadon por la Internacia Lingvo) \*  
\* Skribu al Dieter Lübker, Schäferhof, 2081 Appen, GFR \*  
\* Esperanto-gazetoj estas petataj reprezi tiun alvokon! \*  
\*\*\*\*\*

Partoprenu en la jarĉefkunveno de AGEI, la 6 + 7 okt 73 en Bielefeld, Herforder Str. 45, Lingvocentro de la Universitato

Vizitu la librostandon en Rhein-Mosel-Halle, Koblenz, okaze de la 17a Jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio de la 5 - 7 okt 1973.

La semajno en la radio (pp)

Pekino. La du pekinaj elsendoj ĉi-foje estis bonege aŭskulteblaj, preskaŭ sen perturboj, kaj klare kompreneblaj. Estis la kutimaj informoj pri la evoluo kaj kresko de la ĉina ekonomio. Oni legis raporton pri la nacia festotago kaj la ĉi-okazaj aranĝoj en Pekino, kiun ĉeestis laŭ la raporto milionoj da partoprenantoj. Zagrebo. La meznoktan elsendon de Zagrebo mi ĉi-foje kune kun mia kunlaborantino Gunda Hofmann aŭskultis sur parkejo de la aŭtoŝoseo reveturante de Würzburg al Nürnberg post la teatra prezentado "Proksima Nekonato". La informoj el Jugoslavio temis i.a. pri la vizito de la soveta ĉefministro Kossygin en Jugoslavio. La dua parto de la elsendo konsistis el respondoj al korespondantoj kaj superrigardo de ricevitaj revuoj. Fidela aŭskultanto de Zagrebo estas Bruno Gahler, Hamburg. Oni menciis Pilo-Press kaj GER. - Berno. Claude Gacond daŭrigis sian intervjuon kun la ĝeneva esperantisto Baupierre. La elsendo aprupte ĉesis. D-ro A. Baur raportis pri la UK en Beogrado laŭ informoj de la gazetara servo kaj Heroldo de Esperanto. Laŭ d-ro Baur ne nur Jugoslavio, sed ankaŭ Svislando bone solvis la lingvan problemon interne de la lando. Estas diferenco inter papero kaj praktiko, kiel montras la ekzemplo Belgio. Laŭ la preleganto la 1a ĝenerala kunveno de la kongreso estas teda kaj senvalora, altnivela estis la 2a ĝenerala kunveno. Sangenda laŭ li estas la formo de la kongresa inaŭguro kun la sensignifaj salutvortoj. Varsovio. La Varsovia programo estis ankaŭ ĉi-semajne kiel kutime riĉenhava kaj varia. El la politika parto: La ekonomiaj rilatoj inter la Eŭropa Komuno kaj la Konsilantaro por Reciproka Ekonomia Helpe, la Taŝkenta parolado de Breŝnev pri la problemoj de paco, la ĝenerala kunveno de UNO kaj la randaj interparoladoj de politikistoj el Oriento kaj Okcidento, la problemoj de la araba mondo kaj Israelo. Sur la kultura kampo menciindas la Varsovia aŭtuno, la konata muzika festivalo. Andrzej Pettyn prezentis la tre interesan kaj ĝojigan vortmuzikan elsendon kun la titolo "Renkonto kun Varsovio" dum kiu kantis la E-trubadoro A. Tomecki. La leterkesto ĉi-foje entenis citaĵoj el leteroj de orienteŭropaj aŭskultantoj, nomoj bone konataj al Pilo-Press. Sed ankaŭ futbalo ĉi-foje furoris tra la elsendoj kun komentoj pri la ludo Pollando - Kimrujo. La E-Ekspresso estis sub la signo de funebro: mortis, 42jara, kunlaboranto de la E-redakcio, Zbigniew Zsyczynski (?), akustika prizorganto kaj porokaza regisoro. Pliaj E-E-eroj: Citaĵo el GER 5/73, intervjuo kun la tradukinto de la libro "Mi estas Pelé" kaj ripeto de jam elsenditaj intervjuoj, i.a. tiu kun la redaktoro de Pilo-Press pri la celo de tiu E-informbulteno. ROMO. La unua parto, raporto pri la 44a Itala Esperanto-kongreso estis bonege aŭdebla, sed kiam komenciĝis la Kuriero de Esperanto ekestis perturboj, kiuj malebligis preskaŭ la kompreneblecon. Tamen mi aŭdis la informon pri la enketa kampanjo de Informcentro Esperanto Nürnberg laŭ "Süddeutsche Zeitung".

\*\*\*\*\*

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen Renomoj

Werner Veigel, konata parolisto ĉe Tagesschau de la Unua Germana Televido, kaj Otto Hackmack, membro de la Senato de Hamburg, fariĝis membroj de Ludwig-Zamenhof-Gesellschaft e.V.

Georg Knaus, Bichlberg, gvidas E-kurson por junaj laboristoj de la Federacia fervojo.

Karl Weller, Würzburg, dum sia restado ĉi-somera en San Francisko, estis objekto de kverelo inter ĉinaj kelnerinoj.

Catherine kaj William Schulze, San Francisko, havas gramatikeman hundan. Lia nomo estas "akusativo".



# Aliĝilo

59-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

27 julio-3 aŭgusto 1974

Hamburg, FR Germanujo

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Poŝtĉekkonto de la Kongreso: n-ro 627337 (nederlanda), aŭ

Banko de la Kongreso: Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam, n-ro 42.69.01.444.

Mi aliĝas al la kongreso laŭ la kondiĉoj sur la dorsa flanko kaj laŭ la jena specifo sendas la pagon kune kun la aliĝilo al.....	Kotizo . . . . .
.....	Adopta Kaso . . . . .
per poŝtmandato/poŝtĉekkonto/banko*	Blindula Kaso . . . . .
*pagante per banko bv. aldoni 2,50 gld. pro la bankkostoj.	Literatura Kaso . . . . .
	Adoptaj Gepatroj . . . . .
	Entute . . . . .

Familia nomo, S-ro, S-ino, F-ino (nepre forstreku du)

Persona nomo.....

Hejma lingvo (por statistiki la lingvojn reprezentatajn en la Kongreso) .....

Strato kaj numero.....

Urbo (en latinaj literoj).....

Provinco aŭ gvid-numero (se necesas por la poŝto).....

Lando (en Esperanto).....

Naskiĝojaro (nur por statistiko – la informo restas konfidenca).....

Persona nomo de edz(in)o, kiu aliĝas samtempe (laŭ aldonita aparta aliĝilo).....

Mi estas ĉi-jare individua membro de UEA en kategorio.....

Dato de tiu ĉi aliĝilo...../...../..... Subskribo.....

Aliĝoj estas principe akceptataj ĝis la 20-a de junio 1974.

Por uzo de la administracio

Pago ricevita	Kongreskarto sendita	Statistikita	2-a Bulteno sendita	K.L. sendita
---------------	----------------------	--------------	---------------------	--------------

KONGRES-KOTIZOJ (en guldenoj)	Ĝis 31.12.1974	Ĝis 31.3.1974	Ĝis 20.6.1974
1. Kongresano ne membro individua de UEA . . . . .	98,—	107,80	117,60
2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro (MJ) . . . . .	83,—	92,80	102,60
3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA) . . . . .	68,—	77,80	87,60
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio (1) . . . . .	68,60	75,50	82,30
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio (2) aŭ (3) . . . . .	58,10	65,—	71,80
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara . . . . .	29,—	31,90	34,80
7. Universitata studento ĝis inkl. 30-jara . . . . .	49,—	53,90	58,80
8. Blindulo . . . . .	39,—	42,90	46,80

## ATENTIGOJ

Por la limdatoj kaj por aliaj kondiĉoj de la kotiztarifo validas la dato de la pago.

**Kongresano en kategorio 1** ricevas la revuon „Esperanto” dum la tuta kalendara jaro en kiu okazas la kongreso.

**Universitataj studentoj**, por ĝui la specialan kotizon, devas sendi kun la aliĝilo oficialan ateston pri sia universitataneco.

**Blinduloj**, por ĝui la specialan kotizon, devas sendi kun la aliĝilo oficialan ateston de blindula organizaĵo aŭ de okulkuracisto.

**Gvidanto de blindulo** rajtas aliĝi senpage, sed ne rajtas ricevi la kongresan libron.

**Infanoj** malpli ol 13-jaraj rajtas aliĝi senpage, se samtempe aliĝas almenaŭ unu el la gepatroj. La infanoj ne rajtas ricevi la kongresan libron.

**Aliĝantoj el FR Germanujo** povas sendi sian aliĝilon kun samtempa pago al: 59-a Universala Kongreso de Esperanto, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG. Poŝtĉek-konto: Postscheckamt Hamburg, N-ro 932 09-207.

**INSTRUKCIOJ** pri aliĝo al la Universala Kongreso de Esperanto:

1. Ĉiu partoprenanto devas **nepre** plenigi apartan aliĝilon. Se oni ne havas aliĝilon, uzu samformatan paperon.
2. Donu ĉiujn petitajn detalojn. Skribu klare, tajpe aŭ preslitere. Aliĝiloj ne klare skribitaj restos netraktitaj.
3. Sendu la aliĝilon kaj la pagon rekte al la U.K. aŭ al la landa peranto.
4. Pagu nepre al la sama instanco, al kiu vi sendas la aliĝilon.
5. Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la kompleta pago.
6. Por ĝui la kategorion 2 aŭ 3 de la supra kotiztabelo, la membreco al UEA devas esti jam pagita, kiam alvenas la kongreskotizo.
7. La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la kongreson. Se persono pagas aliĝkotizon por alia, antaŭvidu tion.
8. Se oni deziras sendi kun la aliĝkotizo monon por sia kredito ĉe la kongreso, oni povas tion noti sur la aliĝilo.
9. Pagante por alia persono nepre klare sciigu la celon de la pago kaj skribu la kompletan adreson.
10. Kongresan karton oni ne rajtas fordoni, vendi, aŭ interŝanĝi.